

## KOMITATO-KUNSIDO de dimanĉo la 27-a de januaro 2019

### 0.1. Kontrolo de la ĉeestantoj kaj rajtigitoj

Dimanĉon la 27an de januaro 2019, de la 09:30a ĝis la 17:00a, kunsidis en Parizo la Komitato de Esperanto-France:

Persona nomo	Familia nomo	Mallong.	Komitataneco	Ĉeestas	Senkulp.	Forestas	Rajtigas
Alexandre	André	AA	Repr. de la membraro		✓		MJ
Sylvain	Barrier	SBa	Repr. de la membraro		✓		ER
Claude	Bensimon	CB	Repr. de la membraro	✓			
Raymonde	Coquisart	RC	Repr. de la membraro		✓		ER
Xavier	Godivier	XG	Repr. de la membraro	✓			
Aleks	Kadar	AK	Repr. de la membraro	✓			
Didier	Janot	DJ	Repr. de la membraro	✓			
Maurice	Juy	MJ	Repr. de la membraro	✓			
Julia	Hédoux	JH	Repr. de la membraro	✓			
Didier	Loison	DL	Repr. de la membraro	✓			
Sébastien	Montagne	SM	Repr. de la membraro	✓			
Claude	Nourmont	CN	Repr. de la membraro	✓			
Emmanuelle	Richard	ER	Repr. de la membraro	✓			
Axel	Rousseau	AR	Repr. de la membraro	✓			
Gilles	Tabard	GT	Repr. de la membraro	✓			
Flora	Markov	FM	Repr. de FET			✓	
Michèle	Abada-Simon	MAS	Repr. de FKEA	✓			
Jérôme	Caré	JC	Repr. de GEE		✓		MD
Lucas	Teyssier	LT	Repr. de JEFO		✓		
Jean-Pierre	Boulet	JPB	Repr. de fed. Auvergne			✓	DL
Josette	Ducloyer	JD	Repr. de fed. Bretagne	✓			
Gilbert	Stambach	AG	Repr. de fed. France-Est		✓		
Marianne	Pierquin	MP	Repr. de fed. Paris-Île-de-France	✓			
Florian	Cezard	FC	Repr. de fed. Languedoc-Rouss.		✓		DL
Michel	Dechy	MD	Repr. de fed. Nord	✓			
Marie-France	Condé-Rey	MFCR	Repr. de fed. Poitou-Charentes			✓	
Pascal	Vilain	PV	Repr. de fed. Provence	✓			
Michael	Leibman	ML	Repr. de fed. Rhône-Alpes	✓			

24 komitatanoj ĉeestantaj (18) aŭ reprezentataj (6). La kunsido estas kvoruma.  
Susanna Beglaryan ĉeestas.

### 0.2. Elekto de prezidanto kaj protokolanto

**5 min**

AR prezidas.  
ER protokolas.

### 0.3 Definitivigo de la tagordo, eventualaj aldonoj 10 min

MJ legas leteron de forestanta AA, kiu atentigas la komitaton pri farindaj projektoj (ekz. subteni Barbara Despiny en ŝia agado ĉe UNESKO por agnoski Esperanton kiel monda heredaĵo).

### 0.4 Decido pri la protokolo de la komitatkunsido de la 7a de oktobro 2019 9:59 05 min

#### Voĉdono: ĉu ni aprobas la protokolon ?

2 sindetenas 0 kontraŭas 21 aprobas

## 1. KUNORDIGO (administrado kaj financoj)

### 1.1 Financoj kaj membro-statistiko INFORMO 10:00 SM

#### Kiom da membroj

En oktobra kunsido estis anoncite ke en 2017-2018 estis 594 membroj. Dek unu junuloj, kiuj estas membroj tra Espéranto-Jeunes, estis forgesitaj. Do estis 605 membroj.

En la nuntempa 2018-2019 jam membriĝis 535 homoj, inter kiuj 177 tra loka interasocia kotizo, kaj 47 dumvivaj membroj.

**Nova banka retejo.** La ilo kiu ĉiutage enmetis bankajn datumojn al nia datumbazo estis reprogramita, kaj denove funkcias. Tamen nun kelkfoje kelkaj monĝiroj aperas dufoje, tio restas korektinda.

**Fermo de niaj bankokontoj ĉe CIC (OPCVM).** En oktobro ni diris ke ni devos pagi imposton pro la profito. Tamen post esplorado montriĝis ke neprofitcelaj asocioj ne pagu ĝin. Do ni pagis nur 23€ kiel imposto de la firmaoj por nia kontojaro 2017-2018.

**Aliĝilo.** Pluraj problemetoj okazis pro nekutime malsimpla situacio : novaj kotizoj de UEA, novaj kotizoj de Espéranto-Jeunes kaj limaĝoŝanĝo. Dumvivaj membroj kiuj deziras kotizi per interasocia kotizo nun povas tion fari : ili pagas 20€ (aŭ 10€ por rabatita kotizo) malpli ol nedumvivaj membroj. Ni post eble unu semajno sendos impostatestilojn kaj aliĝilon por kongreso en Dovro.

**Financa raporto** por la kontojaro 2017-2018 estas pretiĝanta.

**Dokumentoj skanitaj** plu restas por trakti.

**Repagoj al federacioj, lokaj kluboj.** Ni konu la estraranojn, ili regule konektiĝu al

[esperanto-france.org/perso](http://esperanto-france.org/perso) por ricevi la listojn kaj por peti monĝirojn kiam ili deziras.

Por aldoni aŭ korekti informojn pri asocio, indas peti al Susanna : [info@esperanto-france.org](mailto:info@esperanto-france.org).

*Flanka temo : problemo kun la adreso [info@esperanto-france.org](mailto:info@esperanto-france.org) (mesaĝo ne ricevita). En tiu kazo oni sendu la eraran mesaĝon kun detaloj, por ebligi enketon.*

### 1.2 Akcepto de novaj membroj DISKUTO 10:16 AR

Ekde novembro 2018, ni ricevis 100 novajn membrojn. Ni deziras scii, ĉu ili havas novajn ideojn por la asocio, kaj ĉu ili volas aktivi por la asocio. AR kontaktis ilin per retmesaĝoj, kaj jam ricevis plurajn respondojn, almenaŭ de kelkaj, iuj estis kontentaj ricevi informon. Kelkaj pretas subteni finance, sed ne havas sufiĉe da tempo por agadi, sed kelkaj plu lernas kaj eble poste povos iĝi aktivuloj.

En la retejo de EF, estas paĝo, kiu listigas, kion la membroj povas fari por la asocio.

<https://esperanto-france.org/devenir-benevole>

Propono de Susanna: sendi membro-libreton al novuloj

**Farenda:** aldoni al la retpaĝo, en la paĝo pri kiel helpi, disdonado de kalendaretoj - helpi por laboro en la sidejo

Propono de MP: kunlabori kun la BNF (skani kaj sendi dokumentojn por Gallica)

RC: Antaŭ kelkaj jaroj, mi havis taskon kontakti la novajn membrojn. Tre interesa sed longdaŭra tasko por unu homo. Bonege estus dividi la taskojn kiel antaŭvidite en la « pasinteco ». RC pretas denove zorgi pri tio se neniu interesiĝas.

### 1.3 Renovigo de la sidejo INFORMO 10:34 CB

CB faris alvokon al Esperanto-Paris-IDF, kiun MP dissendis al la regiona listo, por trovi volontulojn por

labori pri la renovigo de la sidejo. CB havas rendevuon kun plumbisto venontsemajne.

Ni ankoraŭ ne ricevis proponon de volontulo. CB redaktos novan alvokon.

Farenda: klarigi kion ni deziras pri novaj seruro kaj ŝlosiloj.

→ venonta KK: aldoni en la tagordon ke ni voĉdonu por scii ĉu ni uzos la rezervon "extension du siège" por la renovigo de la sidejo.

**1.4 Le Monde de l'Espéranto** **INFORMO** **10:45** **AR**

Ni dungis junan profesion enpaĝigiston (Marine) kiu laboros kun Claude Nourmont po 400 € numere.

**1.5 Ĝisdatigo de la komisionoj kaj laborgrupoj** **DISKUTO** **10:57** **DJ**

Ĉe nia paĝaro alinomi la rubrikon "Commissions" <https://esperanto-france.org/les-commissions> al "Actions et comptes-rendus" kaj tie publikigi:

– la protokolojn de la komitat-kunsidoj de Espéranto-France,

Atentu ke ne ĉiuj informoj en la protokolo ne estu publikaj. En la venontaj ni forviŝos nepublikigendajn partojn.

– liston de labor-grupoj kun preciza farota agado.

Propono: sendi al la membroj la tagordon de la venonta KK-tagordo

**Voĉdono**

**1. Enretigi la pasintajn protokolojn de la komitat-kunsidoj**

**14 kontraŭas** 2 sindetenas 8 aprobas

**2. Enretigi la venontajn protokolojn**

**16 aprobas** 2 sindetenas 6 kontraŭas

**3. Klarigi la celojn de ĉiu laborgrupo sur la retejo**

0 kontraŭas 0 sindetenas **ĉiuj aprobas**

RC: Komisiono Ĝemelaj urboj : aldoni Maurice Juy kaj Pascal Vilain (se iuj deziras, ili rekte kontaktu min)

**2. KONSCIIGO (projektoj, ERIK)**

**2.1 Espéranto au bac - Espéranto dans les écoles** **INFORMO** **11:33** **MJ**

La grupo renkontis na la PEEP kaj FCPE (la du ĉefaj organizoj de gepatroj de lernantoj).

Venontaj agadoj: renkonti sindikatojn de instruistoj, kaj kontakto kun CNED por krei Esperanto-kurson (informo aperos en la jara raporto)

**2.2 Flugfolioj por lernejoj** **DECIDO** **11:48** **10 min** **JD**

*Raporto de la sabata laborgrupo kaj decido pri la presado de tiuj flugfolioj*

La laborgrupo plulaboru por plibonigi la enhavon de la flugfolio.

Voĉdono: **ĉu ĉiuj dokumentoj disdonitaj nome de Esperanto-France estu aprobitaj de la komitato de UFE?**

0 kontraŭas 4 sindetenas **20 aprobas**

## 2.2 Prelegturneoj **INFORMO 12:18 10 min AR**

Georgo HANDZLIK kaj lia filino Dominika prezentis sukcesan kantspektaklon dum UK en Lisbono (rete tajpu "georgo handzlik lisbono" por spekti priajn filmetojn). Ili turneos por ĝin prezenti de la 6a ĝis la 26a de majo 2019.

## 2.4 Klubo 2000 por 2019-2020: ideoj? **DISKUTO 12:19 20 min AR**

### 1. *Sendi lernolibron/vortaron/Eta princo al bibliotekoj*

MP atentigas, ke se ni sendas leteron al bibliotekoj por scii, ĉu ili deziras ricevi librojn, ili ne respondos ĉar tiel ili laboras. Pli bone estas tuj sendi librojn kaj leteron al bibliotekoj (kiuj jam ricevas LME).

Susanna atentigas, ke multekostas sendi vortarojn. Tamen eblas, ke Esperantistoj mem transdonos al sia biblioteko.

Necesas listigi librojn, kiujn ni povos donaci.

## 2.5 Rilatoj kun landaj asocioj **INFORMO 12:40 05 min RC**

La tasko de RC konsistis el listigi la asociojn eŭropajn, viziti la retejojn kaj kontakti la respondeculojn. La celo estas scii por ĉiu asocio ĉu ĝi havas revuon kaj kiamaniere ĝi estas sendita, ĉu ekzistas kursoj, ĉu la asocio printigas librojn, ĉu ĝi partoprenas (lingvo)forumojn, ĉu ekzistas gravaj projektoj, ktp.

Vizititaj retejoj: Britio, Belgio, Aŭstrio, Pollando, Italio, Hispanio, Portugalio, Svislando

Vizitotaj retejoj: Nederlando, Luksemburgio, Germanio, Ĉekio

Pluraj asocioj havas ankaŭ Fejsbukpaĝon / Du aŭ tri aperas nur en la nacia lingvo, dum unu (tiu de Svislando aperas en 5 lingvoj... jam estas 3 lingvoj en tiu lando... / Belgio aperigas ligilon al aliaj asocioj i.a. tiu de Espéranto-France.

Raporto aperos detale espereble antaŭ junio 2019.

## 2.6 Raporto de la komisiono pri ĝemelaj urboj **INFORMO 12:41 05 min RC**

La projekto celas instigi al ĝemeligado de urboj aŭ plifortigo de la rilatoj inter jamaj ĝemelurboj. Kunlabori kun esperantistaj grupoj cele faciligi la kontaktojn.

Komisiito pri tiu fako por Esperanto-France, RC estis nomita komisiito por UEA. La loka plano estas kreado de laborgrupo ĉe Esperanto-France pri ĝemelaj urboj (jam du partoprenantoj aldoniĝis: PV kaj MJ) kaj samtempe kunlabori, kun UEA.

## 2.7 Prezento de la projekto "La Espero" **DECIDO 12:42 10 min PV**

Prezento de la projekto sendita de PV :

*Okaze de niaj Universalaj Kongresoj, ĉe la oficialaj malfermo kaj fermo, ĉiuj ekstaras kaj kantas nian himnon. Ĉi tiuj momentoj ĉiam estas emociplenaj. Ni estas tiam granda homara familio, kiu vivas spite la limojn, religiojn, originojn. Ni donas ĝian lokon kaj ĝian rolon al nia lingvo : 5 kontinentoj, 1 homaro kaj 1 himno, kiu ligas nin. Ĉiujn. Do, ĉi tiuj momentoj estas atendataj de ĉiuj kongresanoj. Se la kanto starigas ĉiujn kun granda fervoro, la muzika subteno restas malforta, eĉ se la akompanado aldonas energion kaj kortuŝon. Sed nia komunumo estas plena je rimedoj : dum evento, kie Espéranto-Provence havis informbudon, la ideo de vera orkestrado de nia himno ekestis kaj rapide vekis entuziasmon.*

*Ni tiam planis efektiviigi la orkestradon de La Espero per blov-, kord- kaj perkutinstrumentoj, kiuj donus al ĝi amplekson neniam konatan. Tio implicas la kreadon de KD, en kiu La Espero estus interpretita simfoniforme, skrupule respektante la tekston kaj la originalan melodion. Ĉar malfacilas produkti KD-on kun la sola himno, ni planis aldoni aliajn originalajn kanzonojn en Esperanto, speciale kreitajn por ĉi tiu okazo.*

Tio eblas, ĉar ni havas je nia dispono ne nur komponiston, sed ankaŭ kompletan orkestron, kies direktoro kaj kantistino pretas senkoste partopreni en la projekto. Ni ankaŭ povas profiti la teknikan subtenon de profesia registro-studio.

La kostoj por la tuta produktado, eĉ se ili estas tre malaltaj se konsideri la amplekson de la projekto, devigas nin serĉi financadon. Por fari tion, ni planas uzi retejon pri kontribua financado. Tamen, ni antaŭenigos ĉi tiun belan projekton ĝis la fino precipe danke al via helpo. Por aliĝi al la projekto, vi povas helpi nin en la serĉado de financado.

Ekzemple, ni povus aldoni sur nian retejon la subtenon de *Espéranto-France*, aldonante la foton kaj subskribon de ties prezidanto, kaj petante donacojn. Por instigi homojn partopreni, ni intencas proponi kompencojn. Ekzemple, ni proponos por 10 eŭroj la elŝutadon de la KD, por 15 eŭroj la presitan KD-on, por 20 eŭroj la KD-on kaj senpagan aligon al la kongreso de *Espéranto-France*. Do, via helpo povus konsisti el kelkaj senpagaj biletoj por tiu evento.

Sed estus aparte interese por ni, se vi partoprenus rekte en la financado, aŭ antaŭmendus kelkajn KD-ojn, kompreneble.

Ĉar ni serĉos financadon per monkontribua retejo kiel *Kiss Kiss Bang Bang*, ni kreis TTT-ejon, kiu klarigas nian projekton. Vi trovos ĝin per ĉi tiu ligilo : <http://www.kanto-espero.org/>

En la KD estos La Espero kaj 9 kanzonoj

### 1. Ĉu eblas havi moralan apogon de *Espéranto-France*

0 kontraŭas 5 sindetenas **19 aprobas**

### 2. Ĉu eblas havi financan subvencion de *Espéranto-France* (300 €, kiel ni faris por la KD *Jacques Brel*)

0 kontraŭas 7 sindetenas **17 aprobas**

3. Ĉu *Espéranto-France* aĉetu ekzemplerojn de la KD por la butiko?

Temas pri normala funkcio. La butiko ĉiam disponebligas en sia katalogo la novajn KDjn.

### 4. Ĉu *Espéranto-France* donacas kongresaliĝkotizon por tiuj, kiuj finance partoprenos?

Pro la franca-brita kongreso, *Espéranto-France* ne mem organizas kaj malfacile povas donaci tian kotizon.

**19 kontraŭas** 5 sindetenas 0 aprobas

## 2.8 Poésie en Liberté

**INFORMO 16:31 10 min GT**

GT dankas la asocion kiu helpis la okazigon (subvencio je 1000 € de EF, disdono de kalendaretoj kaj ekzempleroj de LME en la sakon de la 70-o da premiitoj dank'al helpo de Susanna, hejma gastigado de la gajnintino de la unua premio dank'al DL, partopreno sursceneje de DL dum la ceremonio). Li bedaŭras ke la asocio ne helpis pli, post la ceremonio, raportante pri ĝi sur sia retejo. CN memorigas ke artikolon ŝi aperigis en LME.

Li montras la afiŝon kaj flugfolion por la jaro 2019. La frazo pri ebleco sendi poemon en Esperanto malaperis el la afiŝo kaj el la unua paĝo de la flugfolio. Sed ĝi restas ene la regularo. Almenaŭ por ĉi tiu jaro.

Postkunsido: GT sendis raporton publikigotan sur nian retejon.

## 2.9 Agado pri la eŭropa baloto

**DISKUTO 14:35 10 min SM**

Ĉu UFE sendu leteron al la kandidatoj de la eŭropa baloto?

La plej bone estus sendi al ĉiuj homoj de la listoj, sed kiel?

ML : mi pretas trovi la adresojn de la verdaj kandidatoj.

DL sendu alvokon al listoj por trovi volontajn helpantojn.

Sen pliaj volontuloj, malfacilos plenumi tiun taskon.

### 2.10 **Ĉu Esperanto-France sendu proponon por la "Granda debato"?** **14:32**

*(Propono de Renée Triolle)*

RT: "Ĉu Esperanto-France instigos partopreni la debaton kaj levi la demandon pri lingvo-demokratio, invado de la angla, forigo de la franca kiel kultura perilo ks ? Ĉu la Komitato proponos bazan proponon aŭ argumentaron?"

DL: "Jen efektive interesa sugesto sed mankas tempo mem prepari. Via tekstopropono bonvenas".

RT sendos mesaĝon por ke ni komuniku la proponon.

## 3. **KOMUNUMO (kongresoj, ...)**

### 3.1 **Karavano por UK 2019** **INFORMO 14:48 - 10 min SB**

Susanna diris ke ĝia prezo estas sufiĉe alta (pli ol 3 000 €), kaj malmultaj homoj (6) estas interesataj do ĝi probable ne povos okazi ĉar ni bezonas almenaŭ 12 homojn.

### 3.2 **Kongreso de Espéranto-France 2019** **INFORMO 10 min MD**

Pri la organizado ĉefe zorgas la Britoj.

CN bedaŭras ke ni ne proponas francan programeron.

ML proponas sciencan fakan prelegon pri elektraj veturiloj.

### 3.5. **Landa kongreso 2020: alvoko al kandidatiĝoj** **INFORMO 15:08 - 05 min AR**

RC: Kiam mi havis taskon de la estraro de Esperanto France enketi pri kongreso 2019, mi havis plurajn kontaktojn kun urboj (tiu de interasocio kotizo). Aperis tre rapide la [proponon pri la] urbo Dovro (Britio). Mi do simple ĉesis la taskon, neniam estis planite jam pensi pri 2020, MI TRE ĜOJAS KE ONI PENSU PRI 2020. Mi pretas denove kunlabori por trovi urbon se oni bezonas min.

#### **Ĉu Raymonde zorgu pri tiu tasko?**

0 kontraŭas 1 sindetenas **aliaj aprobas**

### 3.6 **UEA - Revuo Esperanto 15:08**

UEA serĉas volontulojn por voĉlegi la artikolojn de la revuo, kaj ankaŭ volontulon por kunorganizi la teamon.

AR, PV kaj lia edzino estas volontuloj por voĉlegi artikolojn. Ili kontaktos Emilio Cid.

## 4. **KAPABLIGO (instruado kaj ekzamenoj)**

### 4.1 **Metodo 11** **DECIDO 15:14 10 min AR**

Post la fulmrapida vendo de la nova eldono (700 ekzempleroj jam vendiĝis el 1000, t.e. 4500 € enkasigitaj), ni devos baldaŭ pripensi pri la estonteco: ĉu presi denove, 500 (1443 €) aŭ 1000 (1999 €) ekzemplerojn?

DJ opinias ke la kovrilo ne taŭgas por disvendi la libron en biblioteko aŭ librovendejo.

#### **Ĉu ni ŝanĝu la kovrilon?**

4 aprobas 0 sindetenas **16 kontraŭas**

## Ĉu ni denove presu almenaŭ 1000?

0 kontraŭas 0 sindetenas 0 ĉiuj aprobas

### 4.2 Lernolibro

**INFORMO 15:25 - 10 min AR/CC**

Raporto pri la prezento farita de Christophe Chazarein (CC) la antaŭan tagon. CC prezentis la diversajn metodojn por instrui lingvojn dum la lasta jarcento. Li klarigis ke ekde 2001, la CECRL instagis uzi la metodon de "Approche actionnelle". Tiu metodo instruas lingvojn per "konkretaj agoj", la lernantoj devas elturniĝi por atingi diversajn celojn. Ili mem eltrovas diversajn informojn. La projekto de nova lernolibro celas verki tian lernolibron laŭ metodo uzata por instrui la aliajn lingvojn. Ĝi celas grupan instruadon por plenkreskuloj (sed ekde 15/16 jaraĝa, la adoleskantoj povas uzi tian metodon).

### 4.3 Metodo 12

**DECIDO 15:34 15 min AR**

Ni ricevis prezproponon de Robin (2600 €) kiu similas al la prezpropono de la metodo 11. Sed la Metodo 12 ne tiom bone vendiĝas kaj ni certe penos disvendi ilin. Ĉu ni tamen eldonu 1000 ekzemplerojn (sciante ke ni havos ilin dum pluraj jaroj), ĉu ni financu ĝin per Klubo 2000 aŭ prenante parton de la lernolibro kaso? Kiam la nova lernolibro estos preta, Metodo12 povos esti anstataŭigita per tiu nova metodo. Diskuto pri Assimil: ĉu renovigi la iaman metodon? Kaj fakte eĉ reverki la libron... Sébastien Erhard eldonis ludojn ĉe Assimil. DJ sin proponis por trovi volontulojn por verki novan version de Assimil. DL konas la blogiston de ASSIMIL pere de la muzeo Mundolingua. Pri Metodo12, nun estas tro frue por decidi, kion fari.

### 4.4 Eldono de facilaj libroj

**INFORMO 15:49 - 05 min AR**

Nenio nova por diri kaj indas kontakti la eldoniston de la originala libro por subskribi kontrakton kaj aĉeti la kopirajtojn laŭ la prezo voĉdonita dum la pasinta komitatokunsido.

### 4.5 Udemy kurso

**INFORMO 15:49 05 min AR**

Raporto pri kurso en la retejo [udemy.com](https://www.udemy.com) (retejo kiu proponas multajn kursojn pri diversaj temoj) surbaze de la Metodo 11. AR kaj ER esperas prezenti pli konkretan materialon dum la venonta KK.

### 4.6 Eldono de vortlisto eo-fr (ĉe [fluent-forever.com](https://www.fluent-forever.com))

**INFORMO 15:55 05 min ER**

Thierry Spanjaard registris sonojn. Ni povos baldaŭ sendi materialon al la zorganto de la projekto.

### 4.7 Traduko de vortlisto SpeakShake

**INFORMO 15:56 05 min AK**

André kaj Colette finis "Manĝaĵoj" kaj mendis relegon. AK finis "Historio" kaj mendis ankaŭ relegon. Restas tri dosieroj kiuj estis aŭtomate tradukitaj: homoj, lokoj, tradicioj. AK komencis relegi lokojn, ĝis proksime la linio 200. Oni bezonas plurajn homojn por helpi la relegojn. Tiu estas la plej grava afero. Estas kvazaŭ neeble daŭrigi la laboron nur kun tri homoj.

Speakshake ŝajnas bone referencita sur interreto.

AR faris programon por aldoni aŭtomatan tradukadon por helpi la volontulojn. Estas mistradukaĵoj, sed estas pli rapide korekti erarojn ol traduki la tuton.

### 4.8 Strategio por venontaj eldonoj

**DISKUTO 15 min AR**

AR deziras scii ĉu la komitatanoj taksas gravaj niajn eldonprojektojn. MP diras ke sen kulturo, ni mortos. SM memorigas ke tiaj projektoj estas financaj enspezoj por pluraj jaroj. AR opinias ke indos pripensi por traduki novajn bildstriojn.